



Grava informo!

PILO-PRESS sonraportojn el **Eldonanto/Herausgeber**
 Internacia **Ateno pri la 61-a** Ludwig Pickel
 Informservo **Universala Kongreso de Esperanto!** Postfach 2113
 D-85 Nürnberg 1
 Tel. (0911) 46 36 49; 5142 69

N-ro 31/76 - 2 aŭg 1976
Aperas ĉiusemajne

61-a Universala Kongreso de Esperanto-malfermita

El la malferma parolado de la UEA-prezidanto

Ateno (Pola Radio/pp) - Lunde, matene, je la 6-a horo, la Esperanto-Elsendo de Pola Radio disaŭdigis la unuan sonraporton de sia speciala sendito, Jerzy Grum, pri la Universala Esperanto-Kongreso en Ateno.

Jerzy Grum diris: "El Ateno parolas via speciala sendito Jerzy Grum. Hodiaŭ la 1-an de aŭgusto 1976 komenciĝis la Universala Kongreso de Esperanto. Je la 10-a horo matene en la hotelo "Hilton" kolektiĝis la nunjaraj kongresanoj. La enkondukajn vortojn diris la prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, d-ro Humphrey Tonkin. Sekvis salutoj de la urbestro, s-ro Johano Papateodoru. Poste parolis reprezentantoj de la greka registaro, diplomatoj kaj fine, la unua parto, la inaŭguro, pasis.

Posttagmeze je la 17-a horo en la sama hotelo "Hilton" komenciĝis la dua parto de la nunjara ĉefa solenaĵo, la malfermo de la 61-a Kongreso de Esperanto en Ateno.

Kiel kutime paroladon faris landaj reprezentantoj de esperantistaj asocioj, aliĝintaj kaj ne-aliĝintaj al la Universala Esperanto-Asocio. La ceremonion de la salutado kiel kutime gvidis d-ro Victor Sadler, la direktoro de la Centra Oficejo de UEA. Sekvas la kongresa parolado de la prezidanto de la UEA, d-ro Humphrey Tonkin..."

Lunde posttagmeze, je la 16.30 horo, oni povis aŭdi sur la Varsoviaj ŝnodoj kelkajn paroladetojn de landaj reprezentantoj dum la kongresa malfermo. La reprezentanto de Brazilo surprizis la kongresanojn per la informo, ke la ĵus okazinta seminario de esperantistoj decidis inviti la Universalan Kongreson de Esperanto al Brazilo en la jaro 1980. Krome oni povis aŭdi la reprezentantojn el Finnlando, Federacia Respubliko Germanujo, Islando, Japanio, Pollando, Germana Demokratia Respubliko, Sovet-Unio. Per la emociaj vortoj "Pacon kaj Amon!" finis la greka reprezentantino sian paroladon.

D-ro Sadler menciis telegramon el la insulo Samos, "lando, kiu kiel la unua enkondukis la devigan instruadon de Esperanto en la lernejoj."

Kiel jam menciite supre, la malferman paroladon faris la prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin.

Enkonduke d-ro Tonkin rilatis al lagranda verko de la greka filozofio "La Respubliko" de Platono kaj al la Sokrata modelo de tiu "Respubliko" al ties bildigo. "La Esperanto-movado mem estas bildigo, fizika manifestiĝo de idealo, la idealo de komuna lingvo, de kiu ĉiu civitano de la mondo povu komprenigi sin al ĉiu alia civitano kaj per kiu unu el la muroj kiuj nun disigas la homojn, estu fine faligita", opinias la prezidanto de UEA. Kaj pri la Esperanto-Kulturo diris la parolanto, ke la plej humila saluto inter parolantoj de Esperanto, la plej modesta cirkulero por kunsido kontribuas al la Esperanta kulturo kaj niaj kongresoj estas parto de tiu kulturo. Kulturo estas unu el la mirindaĵoj de nia moderna mondo.

D-ro Tonkin plue diris: "Pasintjare mi raportis al vi pri promesoj kaj esperoj. La situacio de nia asocio kaj de la Esperanto-movado, kiu ĉirkaŭas ĝin, signife ŝanĝiĝis inter Kopenhago kaj Ateno. Ĉi-jare eblas paroli ne nur pri estonteco sed pri jamaj solidaj atingoj, ne nur pri pretendoj sed ankaŭ pri sukcesoj. Mi ne volas sugesti, ke ĉiuj niaj problemoj malaperis, almenaŭ en unu sencu nur nun ili vere komen- ciĝas, sed ke montriĝis, ke la ĝenerala strategio de UEA dum la pasinta periodo montriĝis esence prava kaj komencas alporti fruktojn. Tiu strategio havas tri ĉefajn celojn:

La unua estas plifortigi kaj pligliatigi la internan funkciadon de la asocio.

La dua estas sisteme labori por unuecigi la Esperanto-movadon el spirito de kunlaboremo kaj toleremo.

Kaj la tria estas pli klare kaj emfaze prezenti Esperanton al la ekstera mondo.

Tio estas niaj tri ĉefaj celoj."

Rilate al la unua celo d-ro Tonkin atentigis pri la bona informiteco de la UEA-membraro koncerne la agadon kaj la planojn de la asocio. Tia informiteco estas salutinda, ĉar bona informiteco amplektas la mem- braron en la aferojn de la asocio. UEA ne estas aŭ ne devus esti sen- personeca, senvizaĝa burokratio. Ĝi estas vivanta organizo el vivantaj homoj, kaj ĝia ĉefa ekzistokialo estas fari ŝanĝon, ŝanĝon fundamentan en la internacia socio sur la lingva kampo. "Ni ne estas aŭ ne devus esti organizo en rutino, ni devas esti organizo en kampanjo."

En la daŭro de sia parolado la UEA-prezidanto tuŝis ankaŭ la financean situacion de UEA. Multe helpis la Volontula Servo, sen ĝi la asocio estus en "panea stato". La ĝenerala financa situacio pliboniĝis, kio manifestiĝas en la fakto, ke el defcito de 60 000 guldenoj en la jaro 1973 fariĝis gajno de 26 000 guldenoj en 1975, konstatis la parolanto sub forta aplaŭdo. Eblis haltigi la perdon de membroj, kaj kreskis la donacoj. La Societo Zamenhof, la societo de mecenatoj, nun havas 200 membrojn. Baldaŭ kreiĝos nova fako pri informado kaj esplorado. Unu el ĝiaj taskoj estos la realigo de la en Kopenhago anoncita kunvoko de konferenco pri la estonto de Esperanto-movado, fakte ne nepre en la origina formo, sed verŝajne en formo de seminarioj en diversaj landoj, en la venontaj 2-3 jaroj.

Multaj faktoj pruvas, ke la Esperanto-kulturo kreskas kaj floras, same la ekstera informiteco pri ĝi, opiniis la parolanto. UEA devas esti tegmenta organizo por la diversaj fortoj de Esperanto-movado, ankaŭ por tiuj organizoj kaj institucioj, kiuj laboras ekster UEA por kaj per Esperanto.

Laŭ d-ro Tonkin la unuecigo de la movado havas du aspektojn, nome la forigon de superfluaĵ malakordoj kaj la kreon de aktiva kunlaboro. Dank' al la efika laboro de d-ro Denoel malakordoj kun kelkaj Esperanto- asocioj eliminiĝis, denove funkcias kunlaboro kun ILEI, la instruista asocio, regas bonaj neformalaj rilatoj kun SAT, ktp.

Laŭvorte la prezidanto daŭrigis: "Sed, karaj gekolegoj, estas foje mal- facile esti esperantisto. Ni laboras kontraŭ jarmiloj da sencio, ne pri Esperanto, sed pri amaso de aliaj aferoj. Ni klopodas akceptigi ideon tiel grandan, ke ĝi ŝajnas preskaŭ timiga al la ekstera mondo. La progreso estas malrapida, laborpostula. De tempo al tempo homoj laciĝas pri tiu giganta tasko. Estante homoj ili emas vidi en mal- rapida progreso ne la malfacilaĵojn de la tasko, sed la mankojn, eĉ la sabotadojn de aliaj. Ili emas flari komplotojn kie ili ne ek- zistas, bojkotojn, kie ili ne troviĝas, cenzuradon, kie ekzistas nur bona volo. Ili estas nur homaĵ."

D-ro Tonkin rilatis al sia Kopenhaga alvoko al unueciĝo kaj povis konstati, ke la unueciĝo de la movado estas preskaŭ kompleta kaj ke post paso de unu jaro depost Kopenhago "Esperanto ne detruigis, la movado ne disfalis, la asocio ne politikigis kaj la reputacio de Esperanto en la ekstera mondo ne nur ne falis, sed efektive progresis."

Rilate al kritiko, d-ro Tonkin opiniis, ke "ni bezonas kritikadon en UEA, fakte ne estas sufiĉa kritiko pri nia laboro, sed ni devas distingi ĉi-tie inter kritikado kiu progresigas nian movadon eĉ ne unu cent-imetron, kaj kritikado kiu celas ĝuste antaŭenigi la movadon."

Kun optimismo la parolanto deklaris: "Iom post iom cikatroj el pasintaj kvereloj, malfacilaĵoj en la historio, ĉio ĉi, resaniĝos. La movado reunuiĝos kaj ni povas iri pli rapide al la sukcesigo de nia afero."

La tria parto de la parolado estis dediĉita al la eksteraj rilatoj, al la lingva problemo, al la lingva diskriminacio kaj al la kunlaboro kun internaciaj organizoj.

Speciale d-ro Tonkin sin turnis kontraŭ la "angla manio" kaj la ŝajna solvo de la lingva problemo. Male, la solvo de la lingva problemo fariĝas pli kaj pli komplika. Li diris, ke ni laboras por la justeco sur la lingva kampo. La lingva problemo ne nur estas politika, ekonomia problemo, ĝi ankaŭ estas morala demando. La nuna lingva situacio morale ne estas akceptebla. Baldaŭ aperos baza eldonaĵo de UEA pri lingva diskriminacio.

La estonteco de Esperanto kuŝas en niaj personoj, konstatis la UEA-prezidanto. Ni havas respondecon antaŭ la mondo por sukcesigi nian aferon. La vojo estas longa, sed ĝi estas inda.

Al la kongreso aliĝis 1 100 personoj. Pliaj centoj da esperantistoj estas, laŭdire, en la urbo Ateno, kiuj ne aliĝis al la kongreso, sed vizitas publikajn aranĝojn de la kongreso aŭ aĉetas tagajn kongresajn kartojn.

La komitato de UEA havas ampleksan tagordon. I.a. ĝi devos trakti la petojn de la landaj asocioj de Suda Koreujo, de Slovakio kaj de Germana Demokratia Respubliko pri aliĝo al UEA. Jam antaŭ la kongreso aliĝis al UEA la landaj asocioj de Luksemburgio kaj de Islando.

+++++

Salutoj de aliaj kongresoj

De la SAT-kongreso, kiu okazis de la 24-a ĝis la 30-a de julio en la sveda urbo Gotenburgo, sendis salutojn la polaj geaktoroj Kalina Pienkiewicz kaj Zbigniew Dobrzynski, kiuj prezentis dum la kongreso la teatraĵon "La Proksima Nekonato".

Same salutis de la SAT-Kongreso, kiun partoprenis pli ol 300 esperantistoj el 21 landoj, F.W.Poppeck, Oberkirch, Adolf Gültling, Karlsruhe, Helmut Breuninger, Ulm, Gerhard Kunze, Freudenstadt kaj aliaj.

Dum la kongreso la sveda poŝto uzis specialan poŝtstampon kun la Esperanta enskribo "49A ESPERANTO-KONGRESO DE S.A.T."

De la ĉi-jara 28-a Internacia Kongreso de K.E.L.I. okazinta de la 20-a ĝis la 27-a de julio en la franca urbo Montpellier, salutis Siegfried Krüger, Heilbronn. Li skribis i.a.: "Ni estas 74 geparto-prenantoj el 10 nacioj. La plej longan vojaĝon havis la geamikoj el Finnlando kaj geedza paro el Madagaskaro."

Leo Jolliet mortis

En la aĝo de 85 jaroj mortis la 22-an de julio 1976 la fidela kaj aktiva esperantisto Leo Jolliet, Wiesbaden, FR Germanio. Li estis kelkajn jarojn kasisto de la nove fondita GEA post la milito kaj lasttempe aktiva kunlaboranto de la poŝtista E-asocio.

Esperanto en la radio

Vieno. Estas bedaŭrinde, ke tiu stacio de tempo al tempo suferas je perturboj, kiuj grave ĝenas aŭ eĉ malebligas la aŭskultadon. Tiel estas ankaŭ ĉi-semajfine. Nur sub bruo mi povis aŭdi la intervjuon de Emil Vokal kun d-ro Vilho Setälä de Fondumo Esperanto, Finnlando. Survoje al Ateno Vilho Setälä restadis kelkan tempon en Vieno. Pli bone aŭdebla estis la leterkesto, el kiu oni eksciis, ke la "Wiener Zeitung" (Viena Gazeto), la oficiala, plej digne renoma, preskaŭ tricent-jara gazeto de Aŭstrio, publikigis en du eldonoj longan artikolon pri la lingva problemo kaj Esperanto, verkita de profesoro d-ro Helmar Frank, Padern.

Romo. Pli bone ĉi-foje estis aŭdebla la elsendo el Romo. Iomete malfrue la "Novaĵoj el Italujo" sin okupis pri la italaj voĉdonadoj, kiuj okazis la 20-an kaj 21-an de junio. Tamen la analizo de la voĉdonado estis interesa kaj informriĉa. La Kuriero de Esperanto raportis pri "Esperanto-Stenografio en Romo" kaj aliaj okazaĵoj. Prof. Abramo Mosciaro kreis la stenografian sistemon "Stenital", kiu estas regule instruata en la italaj lernejoj. Pri tiu sistemo jam en 1962 aperis en Esperanto kvarpaĝa broŝureto sub la titolo "Plena prezentado de la stenografia sistemo STENITAL". Laŭ iniciato de d-ro Antonio De Salvo en la informilo "Notiziario Stenital" aperas stenografiaĵoj en Esperanto. Esperantistoj, kiuj interesiĝas pri stenografio kaj pretas interŝanĝi ideojn pri la stenografia tekniko laŭ diversaj sistemoj ktp., bonvole skribu al: STENITAL, prof. Abramo Mosciaro, Via Principe Eugenio 3, I-00185 ROMA, Italujo. La informilo estas senpage ricevebla.

Zagrebo. Ĉiam bone aŭdebla estas la meznokta elsendo de Radio Zagrebo. Post la Novaĵoj el Jugoslavio ĉi-foje sekvis recenzoj de kongresaj libroj.

Pekino. Kun speciala atento mi ĉi-foje atendis la Esperanto-elsendojn el Pekino, supozante, ke oni povos aŭdi detalojn pri la terura tertremo. Sed oni nur aŭdis ĝeneralajn informojn pri tio kaj la konstatojn, ke malgraŭ la tertemo la kutima vivo daŭras. Kaj ankaŭ la Esperanto-elsendoj pasis en la kutima maniero kun raportoj pri la 10-a datreveno de la "granda kultura revolucio" kaj pri la Liberiga Popola Armeo.

Svisa Kurtonda Servo. El la intervjuo de s-ro Gacond kun la usona esperantisto, prof. d-ro R. Wood, oni povis ekscii interesajn informojn pri la instruado de fremdaj lingvoj en Usono. Laŭ prof. Wood la fremdlingva instruado en USONO estas en katastrofa stato. La studentoj ne atingas kapablon paroli kaj uzi la lingvojn kaj pro tio protestas kontraŭ la deviga instruado de fremdaj lingvoj en universitatoj, kolegioj ktp. Multaj studentoj rezignas speciale la lernadon de la germana, rusa, franca, lingvoj, kiujn prof. Wood instruas kaj li do povas paroli el propra sperto. En la dua parto de la intervjuo prof. Wood parolis pri la klopodoj enkonduki Esperanton en la usonaj universitatoj. Ĉi-semajne la intervjuo estas la revuo "La Monda Lingva Problemo", redaktata de prof. Wood.

D-ro Artur Baur ĉi-semajne rakontas pri la svisa turisma regiono, tra kiu fluas la reĝo kaj en kiu oni parolas la romanĉan lingvon, situanta en la kanton Grizono.

Varsovio. Hodiaŭ, lunde, la duan de aŭgusto, Varsovio elsendis la unuajn sonraportojn el Ateno, la urbo de la 61-a Universala Kongreso de Esperanto, nome pri la inaŭguro kaj malfermo, kiu okazis, dimanĉe la 1-an de aŭgusto. Pri detaloj vidu aliloke! La venontaj sonraportoj alvenos en Varsovio merkrede, la 4-an de aŭgusto. Per tiuj kablaj, rektaj raportoj, Varsovio denove pruvas sian aktualecon kaj pravigas sian renomon esti la plej grava Esperanto-radiostacio.